Dargaud prezentas: LA GRANDAN Asteriks VOLUMON VII



teksto:
OSCINNY

esegnaĵoj:
UDERZO

# Asteriks kaj KLEOPATRA

## LA PLEJ GRANDA AVENTURO IAM DESEGNITA

IZVORI

DEK KVAR LITROJ DA TUĈO, TRIDEK PENIKOJ, SESDEK DU MOLAJ KRAJONOJ, UNU MALMOLA KRAJONO, DUDEK SEP SKRAPGUMOJ, TRIDEK OK KILOGRAMOJ DA PAPERO, DEK SES SKRIBMAŜINAJ RUBANDOJ, DU SKRIBMAŜINOJ KAJ SESDEK SEP LITROJ DA BIERO ESTIS NECESAJ POR ĜIA REALIGO

LA GRANDA VOLUMO

# ASTERIKS KAJ KLEOPATRA

TEKSTO: GOSCINNY
DESEGNAĴOJ: UDERZO



## ASTERIX APERAS EN JENAJ LANDOJ EN LA RESPEKTIVAJ NACIAJ LINGVOJ:

AŬSTRALIO *Hodder Dargaud*, Rydalmere Business Park, 10/16 South Street, Rydalmere, N.S.W. 2116, Aŭstralio
AŬSTRIO *Delta Verlag GmbH*, Postfach 10 12 45, 70011 Stuttgart 10, Germanio
BELGIO *Dargaud Bénélux*, 17 avenue Paul Henri Spaak, 1070 Brussels, Belgio
BJELORUSIO *Egmont Belarus*, ul. Engelsa 26, Minsk, Bjelorusio
BRAZILO *Record Distribuidora*, Rua Argentina 171, 20921 Rio de Janeiro, Brazilo
BRITIO *Hodder Dargaud*, 338 Euston Road, London NW1 3BH, Britio
BULGARIO *Egmont Bulgaria*, ul. Sweta Gora 7, IV et., 1421 Sofija, Bulgario
ĈEĤIO *Egmont CR*, Hellichova 45, 118 00 Prag 1, Ĉeĥio
ĈINIO *People's Fine Arts Publishing House*, 32 Beizongbu Hutong, Peking, Ĉinio
DANLANDO *Serievorlaget A/S* (Egmont Group), Vognmagergade 11, 1148 Kopenhagen K, Danlando
"ESPERANTUJO" *(Internacia lingvo Esperanto), Izvori*, Trnjanska 47, 41000 Zagreb, Kroatio
ESTONIO *Egmont Estonija Ltd.*, Hobujaama 1, EE 0001 Tallinn, Estonio
FINNLANDO *Sanoma Corporation*, POB 107, 00381 Helsinki, Finnlando
FRANCIO *Dargaud Editeur*, 6 rue Gager Gabillot, 75015 Paris, Francio
GERMANIO *Delta Verlag GmbH*, Postfach 10 12 45, 70011 Stuttgart 10, Germanio
GREKLANDO *Mamouth Comix Ltd.*, 57 Ippokratous St. 106080 Atena, Greklando
HISPANIO *Grijalbo-Dargaud*, Aragon 385, 08013 Barcelona, Hispanio
HONGKONGO (angla) *Hodder Dargaud, c/o Publishers Associates Ltd.*, 11th Floor, Taikoo Trading Estate, 28 Tong Cheong Street, Quarry Bay; (mandarina i kantona) *Gast*, Flat C, 5/F, Block 3, Site 1, Whampoa Garden, Hunghom KLN, Hongkongo
HUNGARIO *Egmont Hungary Kft.*, Karolina ut. 65, 1113 Budimpešta, Hungario
INDONESIO *PT. Pustaka Sinar Harapan*, Jl. Dewi Sartika 136D, Cawang, Jakarta 13630, Indonesio
ISRAELO *Dahlia Pelled Publishers*, Pinsker 64, Tel Aviv 61116, Israelo
ITALIO *Mondadori*, Via A. Mondadori 15, 37131 Verona, Italio
KANADO *Franca lingvo, disvendado* Presse-Import Leo Brunelle Inc., 371 Deslauriers St.,St. Laurent, Quebec H4N 1W2, Kanado; *Angla lingvo, disvendado* General Publishing Co. Ltd., 30 Lesmill Road, Don Mills, Ontario M3B 2T6, Kanado
KOREA RESP. *Cosmos Editions*, 19-16 Shin An-dong, Jin-ju, Gyung Nam-do, Korea Resp.
KROATIO *Izvori*, Trnjanska 47, 10000 Zagreb, Kroatio
LATINAMERIKO *Grijalbo-Dargaud*, Aragon 385, 08013 Barcelona, Hispanio
LATVIO *Egmont Latvia Ltd.* Balasta Dambis 3, Room 1812, 226081 Riga, Latvio
LITOVIO *Egmont Lithuania*, Juozapaviciaus 9 A, Room 910/911, 2600 Vilnius, Litovio
LUKSEMBURGIO *Imprimerie St. Paul*, rue Christophe Plantin 2, Luksemburgio
NEDERLANDO *Dargaud Bénélux*, 3 rue Paul Henri Spaak, 1070 Brussels, Belgija; distribucija: Betapress, Burg. Krollaan 14, 5126 PT Jilze, Nederlando
NORVEGIO *A/S Hjemmet - Serievorlaget*, PB 6853 St. Olavs Pl. 0130 Oslo, Norvegio
NOV-ZELANDO *Hodder Dargaud*, POB 3858, Auckland 1, Nov-Zelando
POLLANDO *Egmond Polska Ltd*, Plac Marszalka J. Pilsudskiego 9, 00-078 Varŝava, Pollando
PORTUGALIO *Meriberica-Liber*, Av. Alvares Cabral 84, R/C-D., 1200 Lisabon, Portugalio
"ROMIA REGNO" (latina) *Delta Verlag*, Postfach 10 12 45, 70011 Stuttgart 10, Germanio
RUMANIO *Egmont Romania S.R.L.*, Calea Grivitei 160, Ap. 47; Cod 78214, Sector 1, Bukurešt, Rumanio
RUSIO *Egmont Russia*, 4/5, 2-nd Tshernilovskiy per. 113326 Moskva, Rusio
SLOVAKIO *Egmont Neografia*, Nevädzova 8, Box 20, 82799 Bratislava 27, Slovakio
SLOVENIO *Didakta Radovljica*, Kranjska cesta 13, 64240 Radovljica, Slovenio
SUDAFRIKO *Angla lingvo: Hodder Dargaud, c/o Struik Book Distributors (Pty) Ltd.*, Graph Avenue, Montague Gardens 7441; *Afrikaansa: Human & Rousseau (Pty.) Ltd.*, State House, 3-9 Rose Street, Cape Town 8000, Sudafriko
SVEDIO *Serieförlaget Svenska AB (Egmont Group)*, 212 05 Malmö, Svedio
SVISLANDO *Dargaud Suisse S.A.*, En Budron B-13, 1052 Le Mont sur Lausanne, Svislando
TURKIO *Remzi Kitabevi*, Selvili Mescit S. 3, Cagaloglu-Istambul, Turkio
USONO *Angla kaj franca lingvoj, disvendado* Presse-Import Leo Brunelle Inc., 371 Deslauriers St., St Laurent, Quebec H4N 1W2, Kanado

Eldonita de: IZVORI, Zagreb, Trnjanska 47, Kroatio
Por la eldonisto: Slavica Štefić
Redaktis: Damir Mikuličić
Tradukis: Nedeljko Korasić
Lingve kontrolis: Robert Moerbeek
Originalo: "Astérix et Cléopâtre"
© DARGAUD EDITEUR PARIS 1965 - by Goscinny & Uderzo
Esperantaj rajtoj: IZVORI, Zagreb
Kompostis: Jelena Vidmar
Preso: Tiskara PULJKO, Zagreb, 1995


GAŬLA VILAĜO
KALKANUM
CICUM
KUKUM
LINOLEUM
BELGUJO
LUTECO
SPQR
ARMORIKO
GAŬLUJO
(ROMIA KONKERAĴO)
50 A.K.
KELTUJO
NARBONA PROVINCO
AKVITANUJO
NI ESTAS EN LA JARO 50 A. K. LA TUTA GAŬLUJO ESTAS OKUPITA DE LA ROMIANOJ. ĈU LA TUTA GAŬLUJO? – ABSOLUTE NE! UNU VILAĜO DE PERSISTEMAJ GAŬLOJ NE ĈESAS REZISTI KONTRAŬ LA ENTRUDIĜINTOJ. KAJ LA VIVO NE ESTAS FACILA AL LA LEGIANOJ GARNIZONTAJ EN LA FORTIKAĴOJ KALKANUM, LINOLEUM, KUKUM, CICUM...

# JEN KELKAJ GAŬLOJ:



ASTERIKS, LA ĈEFHEROO DE NIAJ RAKONTOJ. RUZA MALGRANDA GAŬLO, EGE INTELIGENTA. SEN HEZITO ONI AL LI KONFIDAS LA PLEJ DANĜERAJN TASKOJN. SIAN SUPERHOMAN FORTON LI ĈERPAS EL MAGIA ELIKSIRO DE LA DRUIDO MIRAKLOMIKS.



OBELIKS, LA PLEJ BONA AMIKO DE ASTERIKS. LIVERISTO DE MENHIROJ, ŜTONAJ OBELISKOJ. ŜATEGAS ROSTITAJN APROJN KAJ ĈIAM PRETAS LASI ĈION POR SEKVI ASTERIKS EN ĈIUN AVENTURON. ĈIEN KIE ESTAS BATALOJ KAJ APROJ...



MIRAKLOMIKS, LA TRE RESPEKTINDA DRUIDO EL LA VILAĜO. KOLEKTAS VISKOJN KAJ HERBOJN KAJ PREPARAS DIVERSAJN MAGIAJN ELIKSIROJN. LIA PLEJ GRAVA SUKCESO ESTAS LA ELIKSIRO KIU DONAS SUPERHOMAN FORTON AL LA TRINKINTO. SED, LAŬ NECESO, LI KAPABLAS ANKAŬ FARI ALIAJN MAGIAJN ELIKSIROJN...



MOŜTIKS, LA TRIBESTRO, MAJESTA, KURAĜA, FOJE KOLEREMA. LI ESTAS LERTA KAJ SPERTA MILITESTRO. LIN RESPEKTAS LIAJ TRIBANOJ KAJ MALAMIKOJ TIMAS. MOŜTIKS TIMAS NUR UNU AFERON, KE LA ĈIELO FALOS SUR LIAN KAPON. SED KIEL LI OFTE DIRAS: "TIO VERŜAJNE NE OKAZOS ĈI-VESPERE".



MALMUZIKS, LA VILAĜA BARDO - POETO KAJ MUZIKISTO SAMTEMPE. OPINIOJ PRI LIA TALENTO ESTAS TRE MALSAMAJ. LI OPINIAS SIN GENIA, SED ĈIUJ ALIAJ EN LA VILAĜO NE RESPEKTAS TIAN OPINION. SED KIAM LI SILENTAS, ĈIUJ APREZAS LIN KIEL GAJAN KUNULON.



ALEKSANDRIO, LA ĈEFURBO DE LA EGIPTA REGNO. EN LA PALACO DE KLEOPATRA, LA LEGENDA REĜINO KUN ELSTARA NAZETO...
TION, KION VI DIRAS ESTAS OFENDA, HO CEZARO!...
KONSIDERU LA FAKTOJN, HO MIA REĜINO! VIA POPOLO ESTAS DEKADENCA. ĜI KAPABLAS VIVI NUR EN DEPENDECO DE ROMIO, IUSPECA DUONSKLAVECO.
MIA POPOLO KONSTRUIS LA PIRAMIDOJN! LA TURON DE PHAROS! LA TEMPLOJN! LA OBELISKOJN!
ĈIO ĈI ESTAS ANTIKVA. ĜI NUN TAŬGAS NUR POR ATENDI LA INUNDON DE NILO...
SUFIĈAS!
KRAK!
MI PRUVOS AL VI, HO CEZARO, KE MIA POPOLO KONSERVIS SIAN GENION. ENE DE TRI MONATOJ, EKDE LA HODIAŬA TAGO, MI KONSTRUIGOS GRANDIOZAN PALACON ĈI TIE, EN ALEKSANDRIO!
SE VI SUKCESOS, HO MIA REĜINO, MI NEOS MIAJN VORTOJN KAJ MI KONFESOS KE VIA POPOLO ANKORAŬ ESTAS GRANDA POPOLO...
SED, MI DUBAS PRI TIO!
ŜI ESTAS AMINDA, SED FACILE EKKOLERIĜAS...
KRAK!
...KAJ ĈE TIO ĈARME ELSTARAS ŜIA BELA NAZETO!


IOM POSTE...
RIMARKO: POR KOMFORTO DE LA LEGANTO LA TEKSTO PLU ESTOS SINKRONE TRADUKATA...
NUMEROBIS, MI VENIGIS VIN ĈI TIEN. ĈAR VI ESTAS LA PLEJ BONA ALEKSANDRIA ARKITEKTO... KVANKAM TIO VALORAS NENIOM.
OH!*
* LA LIPOMOVO NE SINKRONAS KUN LA PAROLO, ĈAR EN TIU ANTIKVA TEMPO SINKRONIGO ANKORAŬ NE ESTIS SUFIĈE PERFEKTA.
SEN KONTRAŬDIRO! VIAJ KONSTRUAĴOJ ESTAS NESOLIDAJ! NAJBAROJ AŬDAS TRA LA MUROJ ĈIUN ELPAROLATAN VORTON! PLAFONOJ FALAS!
TION KAŬZAS LA MODERNAJ KONSTRUMATERIALOJ... KROME MI PREFERAS KONSTRUI PIRAMIDOJN KAJ...
SILENTON! REFAMIGU VIN! VI HAVAS TRI MONATOJN JE DISPONO POR KONSTRUI GRANDIOZAN PALACON, ĈI TIE EN ALEKSANDRIO, POR CEZARO.
TRI MONATOJN?
SE VI SUKCESOS, MI SUPERŜUTOS VIN PER ORO; SE NE, MI ORDONOS ĴETI VIN ANTAŬ LA KROKODILOJN! FOR!...
TRI MONATOJN!... MI POVAS PLENUMI TION NUR PER SUPERNATURA POVO! PER HELPO DE IU MAGIISTO...
MI ESTOS SAVITA! MI KONAS HOMON, KIAN MI BEZONAS! LI KAPABLAS FARI MIRAKLOJN!
CLAC!
TRE MALPROKSIME, EN MALGRANDA GAŬLA VILAĜO...
CDXXI* ĈU DENOVE! TIO SIMILAS AL MAGIO!
HE! HO! TIO JA ESTAS MAGIO!
TIU ROMIA LUDO ĈE NI NE ENRADIKIĜOS...
* 421



LA PACO REGANTA EN LA VILAĜO DE NEVENKEBLAJ GAŬLOJ BALDAŬ ĈESOS...
MI DRESAS LA HUNDETON POR PORTADO DE MENHIROJ!...
PLI BONE ESTAS SE VI PREPAROS LA TABLON POR MANĜADO DE TIU GRANDA APRO.
...PRO ALVENO DE IU STRANGA FREMDULO...
AL DRUIDO MIRAKLOMIKS, MI PETAS?
SUPRE SUR LA ARBO, LI KOLEKTAS VISKOJN.
MIRAKLOMIKS?
KIA AGRABLA SURPRIZO!
?!
KARA AMIKO, MI TRE ĜOJAS DENOVE VIDI VIN.
LI ESTAS ALEKSANDRIANO.
MIA AMIKO NUMEROBIS, ALEKSANDRIA ARKITEKTO, KIUN MI EKKONIS DUM MIAJ VOJAĜOJ.
MI VENIS ĈI TIEN, HO MIRAKLOMIKS, ĈAR MI BEZONAS VIAN HELPON...
MI DEVAS ENE DE TRI MONATOJ KONSTRUI PALACON POR CEZARO. SE MI NE SUKCESOS, KLEOPATRA ĴETOS MIN ANTAŬ LA KROKODILOJN!...
...SE VI NE HELPOS MIN PER VIA MAGIPOVO, MI NE SUKCESOS! BOUHOUHOUHOU!
ĈU LA KROKODILOJ ESTAS MANĜEBLAJ...
ŜŜ, OBELIKS!
TRANKVILIĜU, NUMEROBIS! MI JAM SEN TIO PLANIS VIZITI ALEKSANDRION POR KE MI ESPLORU CERTAJN MANUSKRIPTOJN EN LA BIBLIOTEKO!...
NUN ESTAS LA OKAZO! MI AKOMPANOS VIN AL EGIPTIO!...
ANKAŬ NI!
JE OZIRISO, ĈU VI ELDIRIS LA VERON?...
VAŬ!


MI VENIS PER ŜIPO, KIU ATENDAS NIN ĈE LA BORDO.
NI PAKU LA VALIZOJN, NI ADIAŬU LA NIAJN KAJ NI POVOS EKIRI!
VENU, MIA ETA SNUFIKS! NI FAROS BELAN VOJAĜON!
VI JA NE VOLAS ĜIN KUNPRENI?!
SED, KIAL NE, SINJORO ASTERIKS?
ĜI ESTAS ANKORAŬ TRO MALGRANDA POR TIA VOJAĜO. TIAL NE, SINJORO OBELIKS!
KROM TIO, EGIPTIO ESTAS LANDO DE KATOJ. PAKU VIAJN VALIZOJN KAJ EĈ NE VORTON PLU!
ĈIAM LA SAMAJ VORTOJ. MI ESTAS NUR FIGURANTO, NE HAVANTA RAJTON ESPRIMI PROPRAN OPINION!...
IOM POSTE...
AMIKOJ MIAJ, VI ESTOS REPREZENTANTOJ DE LA GAŬLA GENIO SUR LA BORDOJ DE NILO. FIERU PRI TIO, JE TUTATO, KAJ LA ĈIELO NE FALU SUR VIAN KAPON!
HE!
DANKON KAJ ĜIS REVIDO, HO MOŜTIKS, ESTRO NIA!
HE!
HMM?
NE, VI NE KANTU, MALMUZIKS! NE, VI NE KANTU!!!
BONG! BONG! BONG!
SED, MI EĈ NE INTENCIS KANTI... MI VOLIS NUR DIRI KE LI STARAS SUR MIA PIEDO!
IOM POSTE...
VAŬ!
?
MI JA EKBOJIS! PRO TIO ĈAR MI NE RAJTAS PAROLI, MI BOJAS!
NU BONE, MALJUNA DURKAPULO, VI VENKIS! PRENU ĜIN EL LA SAKO!
JEN MIA ŜIPO.


NI POVAS LEVI LA ANKRON, TUMEHERIS!
SED, MI KONVINKAS VIN, ASTERIKS, KE MI NE HAVAS EĈ IDEON, KIEL ĜI APERIS EN MIA SAKO!
BONE, BONE, GRIMPU! PASOS LA FLUSO DE TAJDO!
PELATA DE VINTRA NORDA VENTO LA ŜIPO KUN NIAJ AMIKOJ KOMENCIS LONGAN VOJAĜON AL EGIPTIO, AL LA REGNO DE LA LEGENDA REĜINO KLEOPATRA.
EN EGIPTIO NI DEVOS BATALI KONTRAŬ TEMPO, KONTRAŬ MANKO DE LABORISTOJ KAJ KONTRAŬ ROMIANOJ, KIUJ PENOS KE KLEOPATRA PERDU LA VETON...
KAJ ANTAŬ ĈIUJ, KONTRAŬ PIRAMIDOFIS, MIA KONKURENCANTO, KIU ĈIAM PROVAS MALHELPI MIN... LI HAVAS MULTAJN TALENTOJN...
DO, ĈU TALENTO-HAVA?
NE, SED RIĈA, LI HAVAS MULTAJN ORAJN TALENTOJN. TIO ESTAS MONO, KIUN ONI UZAS ĈE NI.
KAJ DUM LA MARVETURO MINACAS ANKAŬ DANĜERO PRO PIRATOJ!
TIO ESTU NIA ZORGO, ĈU NE, OBELIKS?
KAJ VERE, PROKSIME DE TIE...
BONE, JUNULOJ, POR TIU ŜIPO MI DONIS, KIEL GARANTIO, MIAN FILON ERIKS. DO, ATENTU KE NI NE TRAFU LA GAŬLOJN. NI EVITU GAŬLAJN, FENICAJN KAJ ROMIAJN ŜIPOJN, PER KIUJ ILI KUTIME MARVETURAS.
EGI'TA ŜI'O DE'STRE!
TUJ NI PRILABORU ĜIN! PREPARU VIN POR ALKROĈO KAJ ATAKO!






* LA KUBO ESTAS ĴETITA


LA SEKVAN MATENON...
TUJ POST LA ALBORDIĜO MI GVIDOS VIN AL LA PALACO POR KE MI PREZENTU VIN AL LA REĜINO.
EN LA PALACO, MAJESTO KLEOPATRA ĜUSTE MENDAS SIAN ŜATATAN DESERTON: PERLOJ SOLVITAJ EN VINAGRO.
JE OZIRISO! KIE DO ESTAS LA KAPTILO POR PERLOJ?
PRENU DO, GUSTUMISTO, FARU VIAN DEVON!
JES, MIA REĜINO.
TIU MANĜEGULO DENOVE ALDONIS KVAR TROAJN PERLOJN EN LA VINAGRON!
UFFF! MI MALŜATEGAS TRO PERLUMITAN VINAGRON!
ARKITEKTO NUMEROBIS PETAS LA MOŜTON AKCEPTI LIN!
LI ENIRU...
HO, MIA REĜINO! JEN MIAJ GAŬLAJ AMIKOJ. MAGIISTO KAJ KURAĜAJ BATALANTOJ, KIUJ HELPOS NIAN ENTERPRENON...
SNUFIKS!
GRRRAOORRR!
BONE, URĜU VIN! LA TEMPO PASAS. CEZARO JAM ĈIUTAGE PRIMOKAS MIN. SE VI SUKCESOS, ABUNDOS ORO POR ĈIU... SE NE... KROKODILOJ PROFITOS!
MI INFORMAS VIN, NUMEROBIS, VIA KONKURENCANTO PIRAMIDOFIS TRE AVIDE DEZIRAS ANSTATAŬI VIN, KAJ KONSTRUI LA PALACON POR CEZARO. LI TRE ĜUUS OBSERVI FINIĜON DE VIA KARIERO EN LA STOMAKO DE KROKODILO, KAJ NUN, FOR!
ŜAJNAS KE ŜI HAVAS MALFACILAN NATURON, SED ELSTARAN NAZETON....
TRE ELSTARAN NAZETON...


MI GVIDOS VIN AL MIA HEJMO...
TIO ESTAS VIA DOMO, ĈU?...
HMM... JES, MI MEM KONSTRUIS ĜIN!...
NVMEROBIS
LA PORDON ONI MALFERMAS IOMETE MALFACILE. ERARO EN LA PLANOJ.
MI HELPOS AL VI.
KRAK!
NE, OBELIKS!
NE INSULTU LIN... FAKTE, TIEL ESTAS PLI PRAKTIKE.
HE... ATENTU, KIEL VI PAŜAS!
MI VIDAS, NUMEROBIS, KE VI VERE BEZONAS NIAN HELPON.
ĈI TIE MI LABORAS... MI PREZENTAS MIAN FIDELAN SKRIBISTON, SKRIBOBIS. LI TRE BONE PAROLAS VIAN LINGVON KAJ KROME ĈIUJN VIVANTAJN LINGVOJN: LA LATINA, LA GREKA, LA KELTA KAJ LA ALIAJ...
ĈU ESTAS BONA POZICIO ESTI SKRIBISTO?
HO, TIO ESTAS SIDPOZICIO.. PLI BONE DIRI KAŬRPOZICIO.
KIEL ONI FARIĜAS SKRIBISTO?
MI LERNIS PER KORESPONDA KURSO... LA BONA LERNEJO...
... KIU HAVAS SLOGANON: SE VI SCIAS DESEGNI VI ANKAŬ SCIAS SKRIBI!



ARKITEKTO PIRAMIDOFIS DEZIRAS PAROLI KUN MI? LI ENIRU!
NUMEROBIS! TUJ AL LA AFERO. NI KUNSTRUU KUNE LA CEZARAN PALACON! SE NI SUKCESOS ĜIS LA LIMDATO, NI DIVIDOS LA ORON...
SE NI NE SUKCESOS, KROKODILOJ FORMANĜOS NUR VIN... CETERE, KIAL ILI FORMANĜU NIN AMBAŬ, SENUTILE ESTUS DONI AL ILI DU.
MI RIFUZAS! AL MI NE PLAĈAS VIA LABORMANIERO. VI UZAS SKLAVOJN, KIUJ FALAS MORTAJ PRO LACO! VI ESTAS KRUELA KAJ MALVIRTA!
FOR EL MIA DOMO!
FOJE VI BEDAŬROS! MI ZORGOS KE KLEOPATRA PERDU LA VETON! VI KAJ VIAJ AMIKOJ ESTOS ĴETITAJ ANTAŬ LA KROKODILOJN! MI DEZIRAS AL ILI BONAN APETITON!
?!?
BONG!
LIAJ VORTOJ ESTAS KIEL TRANĈILOJ!
TIU MORDAS PER VORTOJ!
LI MANĜEGAS PER SIA MALAMEGO!
LI ESTAS MALICA!
NE UZU TIAJN ESPRIMOJN!...
... ILI MEMORIGAS MIN PRI LA KROKODILOJ!
SNUFIKS!
PLI BONE NI IRU AL LA KONSTRUEJO EN LA PERIFERIO DE ALEKSANDRIO. VI VIDOS KIEL ONI KONSTRUAS ĈE NI!...
?!
BRADABUUUM!


JEN LA KONSTRUEJO... MI JAM HAVIGIS BONKVALITAN ŜTONON EL ŜTONEJO EN LA INTERNO DE LA REĜOLANDO...
ĈU ILI ESTAS SKLAVOJ?
HO NE! MANKAS SKLAVOJ. ONI NE PLU POVAS LABORIGI ILIN. ILI ESTAS TRO POSTULEMAJ. ĈI TIUJ ESTAS LIBERAJ LABORISTOJ.
SED, LA VIPO?
ĈE NI ONI EĈ PAŜAS EN LA RITMO DE VIPADO. ANKAŬ VIPANTOJ ALTERNAS...
VIIP!
CETERE, EKRIGARDU...
VIIIP!
STRANGA LABORMANIERO!
SED, NE! TIEL, ĈIUJ ESTAS KONTENTAJ. TIO ESTAS NENIO. SE ONI EKMOVAS VIN PER ETA VIPBATO!
BOUHOUOUOU
LA SIGNALO POR LA TAGMEZA PAŬZO... VENU VIDI LA PLANOJN POR LA PALACO. HAL-SUPRE EN LA TENDO.
TIUJ DU TIE. KIAL ILI NE ĈESAS LABORI?
ILI LABORAS POR SUPERHOROJ.
VIIIP!


AL LA LABORISTOJ, KIUJ RIPOZAS KUN TELERO DA LENTO,* VENAS NEATENDITA VIZITANTO...
* KUTIMA NUTRAĴO DE EGIPTOJ
... KIES PROPONOJ PROVOKIS ĈE ILI VIGLAN INTERESON.
HI, HI, HI, HI, HI, HI!
KAJ POST LA SIGNALO POR LA FINO DE LA PAŬZO...
BOUHOUHOUHOU
... LA LABORISTOJ MONTRIS...
... EVIDENTAN MALEMON AL LA REVENO.
MASTRO! LA LABORISTOJ RIFUZAS DAŬRIGI LA LABORON! MI SUPOZAS KE IU INCITIS ILIN KONTRAŬ NI!
ĈI ĈIUJ ZORGOJ VENENAS MIAN SANGON. LA KROKODILOJ KONSTATOS KE MI NE ESTAS MANĜEBLA!
DES PLI BONE! AŬ, ĈU VI VOLAS ESTI BONGUSTA?
SED, ILI ESTAS SANKTAJ KROKODILOJ! ONI NE RAJTAS DONI AL ILI KION AJN POR MANĜADO!
ILI FRENEZAS, TIUJ EGIPTOJ!



EKIRU, POR KE NI VIDU KIO OKAZAS!
TION MI JAM SUPOZIS. ILI DENOVE POSTULAS MALALTIGON.
ĈU VI VOLIS DIRI PLIALTIGON?
NE, NE TEMAS PRI LA SALAJROJ, ILI ESTAS BONE PAGATAJ: ILI POSTULAS MALALTIGON DE VIPFREKVENCO... SED SE MI MALALTIGAS LA FREKVENCON ILI LABOROS MALPLI RAPIDE KAJ LA PALACO NE ESTOS FINITA ĜUSTATEMPE!
TIU VIA VIPADO JAM NERVOZIGAS MIN! TIEL ONI NE TRAKTU HOMOJN! ASTERIKS, EKHEJTU SUB TIU KALDRONO!...
MI MONTROS KIEL ONI STIMULAS HOMOJN POR LABORO!...
NE, NE VI!
BONE.
ASTERIKS, PRAKTIKE DEMONSTRU AL ILI KIEL TIO EFIKAS!
POF!


ĈU TIO VERE ESTAS MIRAKLO!
HO JES! DIRU AL LA HOMOJ KE ILI VIGLIĜU. AL ĈIU MI DONOS IOMETE DE MAGIA ELIKSIRO.
NE.
BONE.
NE!
KIEL LI REKONIS MIN, SPITE AL MIA TRANSVESTIĜO?
BELEGE ESTAS VIDI KIAM LABORO FARIĜAS ĜUO, AKOMPANATA PER KANTADO, ŜERCO KAJ PROVERBOJ, BEDAŬRINDE NE TRADUKEBLAJ...
NI PROGRESAS!
GRRRRRRRRR
?
GRRRRRRRR
* VAŬ VAŬ VAŬ




HELPE DE FREMDA MAGIISTO NUMEROBIS FINE EĈ SUKCESOS! IO ESTAS FARENDA!
ŜRAŬBOBIS!
PIRAMIDOFIS, MASTRO MIA!
MI SCIAS KE NUMEROBIS ATENDAS KONSTRUŜTONARON VENONTAN ŜIPE EL LA SUDO. SED LA ŜTONARO DEVAS NE ATINGI LA KONSTRUEJON! JEN LA ORO POR KE VI MALEBLIGU TION!
ŜRAŬBOBIS RENKONTIS LA KONVOJON, KIU TRANSPORTIS LA ŜTONARON POR LA KONSTRUEJO DE NUMEROBIS. PER ORO KAJ PESO AKIRIĜAS SUKCESO!
MALŜARĜU LA ŜTONARON!
NE SUR LA BORDON! KONTRAŬFLANKEN
BOF!
LA LABORISTOJ EL LA SUDA EGIPTIO LABORAS SENRIPROĈE
PLAF!
PLONĜ!
TION ONI NUN KOMPRENU!
ĈU MIA ESTRO EBRIIĜIS?!


KIAL LA LABORISTOJ NE PLU LABORAS?
MANKAS LA ŜTONARO, MI JAM ESTAS ZORGOPLENA. LA KONVOJO EL LA SUDA REGIONO MALFRUAS!
NUMEROBIS! ALVENAS LA KONVOJESTRO KUN LA ŜTONARO POR LA KONSTRUAĴO!
FINFINE!
!
LI DIRAS, ŜTONMINEJOJ ESTAS ELĈERPITAJ. ĈI TIO ESTAS LA SOLA KION LI POVIS ALPORTI. LI POSTULAS LA PAGON DE LA VOJAĜKOSTOJ.
MI SUPOZAS KE LI MENSOGAS!
ĈU MI RAJTAS BABILIGI LIN, ĈU MI RAJTAS?
JES, SED NE TRO MAL-DELIKATE!
KIEL ONI DIRAS: PAROLU?
PAF! PAF! PAF! PAF! PAF! PAF!
LI DIRAS, KE PIRAMIDOFIS PAGIS AL LI POR KE LI ĴETU LA ŜTONARON EN NILON, KE EN LA ŜTONMINEJO ABUNDAS DA ŜTONOJ KAJ KE LI TRE VOLONTE IROS TIEN KAJ TRANSPORTOS ĜIN KAJ LI PETAS KE ONI NE BATU TIEL FORTE KAJ LI ĴURAS JE IZISO, OZIRISO KAJ SERAPISO KE LI NENIAM PLU FAROS MALBONON.
POR KE NI ESTU CERTAJ, NI IRU KUNE AL LA ŜTONEJO
JES, SED URĜE! LA TEMPO FLUGAS!



IOM POSTE...
NI NUN ŜIPIROS KONTRAŬFLUE AL LA SUDO.
SAMTEMPE ĈE LA FIULO PIRAMIDOFIS...
MI EKSCIIS KE LA FREMDULOJ KIUJ FARAS MIRAKLOJN, HEM EKIRIS POR LA ŜTONARO. ILI DEVAS MALSUKCESI, ŜRAŬBOBIS! AŬSKULTU!
LA KONVOJO DE ŜIPOJ MALRAPIDE GLITAS SUR LA BELEGA SANKTA RIVERO NILO.
NI ESTAS TIEL MALRAPIDAJ!
TRE MALRAPIDAJ!
TRO MALRAPIDAJ!
LA ŜIPOJ PROKSIMIĜU AL LA BORDO KAJ ESTU FORTIKE KUNLIGITA PER ŜNUROJ!
FINE IOMETA EKZERCO!
?
JE TUTATO! KVANKAM MI SCIAS KE LI KIEL INFANO FALIS EN LA MAGIAN ELIKSIRON, ĈI TIU KNABO ĈIAM REMIRIGAS MIN!
NOKTIĜIS. RIPOZO SUR LA BORDO DE LA RIVERO NILO...
LENTO! EĈ NE PECO DA APRAĴO... POSTE ILI MIROS KE MI ESTAS TIOM MALFORTA!
MORGAŬ NI VIZITOS LA SFINKSON KAJ LA PIRAMIDOJN. ILI TROVIĜAS TIE PROKSIME KAJ ESTAS PENINDAJ!
SED EN LA MALLUMO PERFIDA MALAMIKO SUBAŬSKULTAS, EMBUSKAS KAJ SPIONAS...
AHA, AHA, AHA!


VEKIĜU, VEKIĜU! DORMEMULOJ! LA SUNO JAM LEVIĜIS! NI EKIRU VIDI LA SFINKSON KAJ LA PIRAMIDOJN!...
HMM! ANKORAŬ IOMETE... HMMM...
IOM POSTE...
DO, KION VI DIRAS? PENINDE ESTIS IOM PLILONGIGI NIAN VOJAĜON, ĈU NE?
MAJESTA, JE BELISAMO...
SNUFIKS! LASU ĜIN!
GRRR!
NOBLA FREMDULO, ĈU VI DEZIRAS VIAN PORTRETON KUN LA SFINKSO?
KIAL NE? ĜI BONE HARMONIOS KUN MIA KABANO.
NI IRU ĈIRKAŬE!
BONE.
LA ŜULTROJN REKTE AL MI. LA KAPON PROFILE. NE MOVIĜU, MI PETAS VIN.
DE SUPRE CERTE ESTAS PLI BONA PANORAMO.
NE, OBELIKS, TIO CERTE ESTAS MALPERMESITA.
ASTERIKS ĈIAM DEVAS KOMANDI. PRI TIO NE ŜERCU!
!
KRAAK!
?


BONEGE, OBELIKS! MI GRATULAS!
ĈU EBLE ONI POVUS GLUI ĜIN?
VI DEVAS VERE ĈION DETRUI! FELIĈE, NENIU VIDIS KIO OKAZIS. LA SOLA KIO ESTAS FAREBLA ESTAS ENFOSI LA NAZON EN LA SABLON.
IOM POSTE...
TIEL!
CERTE ESTAS KE TIE NENIU SERĈOS ELFOSAĴOJN!
SNUFIKS!
VENU, MIRAKLOMIKS, NI NE RESTU PLU ĈI TIE! MI KLARIGOS AL VI!
KLARIGI? KIAL KLARIGI?
SED MIA PORTRETO ANKORAŬ NE ESTAS FINITA!
?
DOMAĜO! KIOM ĜI SIMILAS AL LA MODELO... PRECIPE LA SFINKSO...
SED... LA SFINKSO?!
Poc!
Poc!
TIEL VI NUN EKSCIIS KIAL LA SFINKSO NE HAVAS NAZON. TIO ESTAS VERA DOMAĜO, ĈAR LA NAZO, KIUN ONI NENIAM RETROVIS ESTIS TRE BELA. TAMEN NE TIEL BELA KIEL TIU DE KLEOPATRA, KIU ESTIS, KIEL MI VERŜAJNE JAM DIRIS, ELSTARE BELA.


KONSTRUINTE LA PIRAMIDOJN, LA TOMBOJN DE LA FARAONOJ, EGIPTOJ DONACIS AL NI UNU EL LA MONDAJ MIRAKLOJ!
BELEGE!
PA! PLI MULTE VALORAS UNU BELA MENHIRO!
DE SUR LA PINTO DE LA PIRAMIDO RIGARDAS NIN DUDEK JARCENTOJ.
ĈU VI HAVAS INTERESON VIZITI LA INTERNON DE LA PIRAMIDOJ?
ĈU? MI SUPOZIS KE NE EBLAS PENETRI EN TIUJN TOMBOJN...
ILI FRENEZAS TIUJ EGIPTOJ...
RABISTOJ JAM PENETRADIS... NUR MALMULTAJ ELIRIS...
KOMPRENEBLE. NOBLAJ VIZITANTOJ KIEL VI FIDU AL MI...
NU BONE, NI AKCEPTAS KUN PLEZURO...
ETAJ HUNDOJ NE RAJTAS ENEN... DO, ATENDU NIN EKSTERE... SE VI ESTOS PRUDENTA, VI GAJNOS POSTE BELAN OSTON!
EN LA PIRAMIDO...
NE PERDU MIN EL LA VIDO, ĈAR SOLAJ VI VIVANTAJ NE ELIROS EL LA LABIRINTO.
ENIRU, ENIRU... LA HIEROGLIFOJ KIUJ ORNAMAS ĈI TIUN HALON ESTAS BELEGAJ
VLAM!
?!
NENIAM PLU VI ELIROS, FREMDULOJ, ĈI TIU TOMBO ESTOS ANKAŬ VIA TOMBO!


SE ILI IAM ELIROS EL ĜI, JE IZISO, MI ĴURAS KE MI NENIAM PLU RAZOS LA KAPON!
BONE. UNUE NI MALFERMU ĈI TIUN PORDON.
IO SIMILA NE POVUS OKAZI EN IU MENHIRO!
EN JENAJ CIRKONSTANCOJ MI UNUAN FOJON DONOS AL VI IOM DE LA MAGIA ELIKSIRO.
ĈU VERE?
SE ONI JA DIRAS AL VI!
UNU, DU, TRI GUTOJ... SUFIĈOS.
KAJ NUN MALFERMU LA PORDON!
MI TRE KONTENTAS KE NI ENIRIS EN LA PIRAMIDON...
PAF!
SWOUSH!!
MI EĈ NE RIMARKAS GRANDAN DIFE-RENCON ANTAŬ KAJ POST LA ELIKSIRO...
EN LA LABIRINTO DE KORIDOROJ NI DEVAS TROVI LA ELIRON...
TIO ESTOS PLEJ MALFACILE...
KELKAJN HOROJN POSTE...
JAM LA DEKAN FOJON NI REVENAS AL LA SAMA LOKO. LA FARAONOJ HAVIS BONAJN ARKITEKTOJN.
LA SITUA-CIO ESTAS SERIOZA...
TRE SERIOZA... MI EKMALSATAS.
25


EN LA PIRAMIDO...
MIAJ POVOJ ESTAS NESUFIĈAJ POR VIN ELIGI DE ĈI TIE...MI OPINIAS KE TIO ESTAS LA FINO DE NIAJ AVENTUROJ, JE BELENOSO.
MI KOMPATAS NIAN NUMEROBIS... SEN NI LI FINOS EN LA FAŬKO DE KROKODILO.
KAJ MI KOMPATAS MIAN ETAN POVRAN SNUFIKS... ĈU NE SNUFIKS?...
SNUFIKS?!
JES, SNUFIKS! NUN NE RIPROĈU ĈAR MI KONDUKIS ĜIN. CETERE, MI NE KONDUKIS ĜIN, ĜI MEM VENIS!
JES, ĜI TROVIS NIN DANK' AL SIA FLARPOVO... DO, ĜI POVAS TROVI LA SAMAN VOJON REEN KAJ KONDUKI NIN EKSTEREN!
TIO ESTAS CERTE!
SNUFIKS, SE VI HELPOS NIN ELIRI EL ĈI TIE VI GAJNOS GRANDAN OSTON!
VI GAJNOS EĈ DU OSTOJN!
AMASON DA GRANDAJ OSTOJ!
OBELIKS, MI PETAS VIAN PARDONON. BONA IDEO ESTIS KUNPORTI LA ETAN HUĈJON.
FOJE MI HAVAS LA IMPRESON KE ĜI KOMPRENAS ĈION KION ONI DIRAS AL ĜI!


?
LA FREMDULOJ MALAPERIS. VI NE DEVAS PLU DAŬRIGI VIAN VOJAĜON.
HI KOMPRENIS!
?
MAGIISTOJ! VI ESTAS MAGIISTOJ! NUR SUPER-HOMA ESTAĴO POVAS TROVI ELIRON EL LA LAB...
PAFF!
LA ŜIPOJ DAŬRIGAS SIAN VOJAĜON. ILI FACILE PROGRESAS KONTRAŬ LA FLUO DE NILO...
... LA VOJAĜO ESTAS AGRABLA, KUN INTERESAJ APUDAJ HALTEJOJ. LUKSOR EKZEMPLE...
NE, NE KAJ NE, OBELIKS. TIU OBJEKTO EN LA MEZO DE NIA VILAĜA PLACO? TIO ESTUS RIDINDA, ĈU VI KOMPRENAS!
NI NENIAM HAVAS SAMAN OPINION!
INTERTEMPE, EN ALEKSANDRIO...
HO, PIRAMIDOFIS, MIA MASTRO! ILI ESTAS MAGIISTOJ! SUPERHOMAJ ESTAĴOJ!
!?
ILI SUKCESIS ELIRI EL LA GRANDA PIRAMIDO!
MAGIO! ILI ESTAS MAGIAJ!
ANKORAŬ PLIA KAŬZO TROVI RIMEDON POR MALEBLIGI AL ILI HELPI AL NUMEROBIS EN LA KONSTRUO DE LA PALACO, ŜRAŬBOBIS!


POST LA VOJAĜO DE MULTAJ STADIOJ*...
FINE, MIAJ AMIKOJ, NI REVENIS.
NI TRANSPORTIS SUFIĈE DA ŜTONO POR LA FINKONSTRUO DE LA PALACO!
*TADIO ESTAS ANTIKVA MEZURO EKVIVALENTA 168 METROJN. SE ONI SCIAS KE UNU FUTO ESTAS 33 CENTIMETROJ KAJ UNU ALEKSANDRO HAVAS 12 FUTOJN, ONI POVAS KALKULI KE UNU STADIO VALIDAS 42 ALEKSANDROJN.
HELPE DE LA MAGIA ELIKSIRO LA LABORO PROGRESAS TRE RAPIDE.
SE MI NE ESTUS ĈI TIE KAJ NE KOREKTUS LA PLANOJN...
ĴUS MI EKSCIIS KE KLEOPATRA VENAS VIZITI LA KONSTRUEJON!
KAJ VERE...
NE INTERROMPU LA LABORON! MI ESTAS ĈI TIE INKOGNITE, MODESTE... DAŬRIGU NUR TIEL, EN ORDO!
ONI NE POVAS KONTRAŬDIRI, KE ŜI HAVAS ELSTARAN NAZON!
TRE BELAN NAZETON!
ĈU VI VIDIS ŜIAN NAZON, SNUFIKS?
SAMTEMPE, ĈE PIRAMIDOFIS.
MI CERBUMAS, MI DEVAS ION ELPENSI!
HELPU MIN! KAJ LASTFOJE MI DIRAS AL VI: RAZU LA KAPON!
MI NE POVAS, MASTRO, ĴURO...
TERURA IDEO VENIS AL MI...
PAF!



PORTU LA PAKAĴON AL LA REĜINO KLEOPATRA!
JES, MASTRO.
IOM POSTE...
ĈU DONACO? DONU ĜIN!
KUKO! ĈU ANKAŬ MESAĜO?
RESPEKTE AL LA REĜINO DE ĈIUJ REĜINOJ, DE LA TRI GAŬLOJ.
TRE AFABLE.
FAKTE ŜI HAVAS TRE BELAN NAZON.
DOMMASTRO!
SERVU ĜIN POR LA VESPERMANĜO!
INTIMA VESPERMANĜO... MI ESTOS SOLA, DO, NUR 40 GEDANCISTOJN, 80 MUZIKISTOJN KAJ NUR 300 NORMALAJN PLADOJN.
KAJ TIUN VESPERON EN LA KONSTRUEJO...
AL LA TABLO, AL LA TABLO. NI HAVAS APROJN ALVENINTAJN PER GALERO.
NI VENIS ARESTI LA TRI GAŬLOJN. ORDONO DE LA REĜINO!
?!


KION NI FARU NUN? ĈU MI BATU ILIN?
FARU NENION! SE VI KONTRAŬSTARAS LA VOLON DE LA REĜINO, VI PEREOS!
IOM POSTE...
HA, GAŬLOJ! VI VOLIS VENENI MIN PER TIU KUKO! VI PAGOS TION PER VIA VIVO!
KUKO? KIA KUKO?
ALPORTU MIAN GUSTUMISTON!
CLAP!
LI GUSTUMIS NUR PECETON DE LA KUKO KAJ RIGARDU KIEL LI FARTAS!
SED TIO ESTAS IU MISKOMPRENO. ĜI ESTAS TUTE BONA! NI ESTAS SENKULPAJ!!!
* HO VE! HO VE! HO VE!
MI VOLAS NENION PLU AŬDI!
SED...
SE LA REĜINO VOLAS NENION AŬDI, NI DIRU NENION, ASTERIKS... POR LA MOMENTO!
FORKONDUKU ILIN! ILI ESTU ANTAŬMANĜO POR LA SANKTAJ KROKODILOJ!
KIAL VI NE VOLIS KE MI KLARIGU AL ŜI!
MI HAVAS IDEON...
... KAJ KROME VI NE POVAS DISPUTI KUN KLEOPATRA... ŜI HAVAS MALBONAN NATURON, SED BELAN NAZETON!


SE MI NUR EKPENSAS KE POR LA VESPERMANĜO ESTIS APRO...
ASTERKS, DONU AL MI KRUĈON KUN AKVO!
KION VI PREPARAS, MIRAKLOMIKS?
KONTRAŬVENENON. FELIĈE, MI NENIAM DISIĜAS MIN DE MIA SAKETO...
TRINKU!
ĈU ĜI ESTAS LA KONTRAŬVENENO?
MALFERMU LA PORDON DE LA MALLIBEREJO, OBELIKS!
FOR! NI ELIRAS!!!
HA! HA! HA! HA! HA! HA!
KRAAAK!
ILI FRENEZAS, TIUJ EGIPTOJ! DECE ONI DIRAS - FOR, KAJ ILI...
KAJ NUN NI EKIRU AL KLEOPATRA!
PLAĈA, SED DENOVE PROFILE... ĈU ONI FOJE NE POVUS DUONPROFILE?
HO, MI, TIU MODERNA ARTO, KOMPRENU...
PERMESU!
PAF!
POF!
?!!



GAŬLOJ, ĈAR VI DECIDIS MORTIGI MIN, JE OZIRISO, MI DEMONSTROS KIEL MORTAS VERA REĜINO!
SED NE, JE TUTATO! AŬSKULTU ALMENAŬ FOJE, KION NI DEZIRAS DIRI AL VI!!!
MI ESTAS CERTA KE LA KUKO NE ESTAS VENENA! KONTRAŬE, MI SUPOZAS KE ĜI ESTAS TRE BONGUSTA!
HO JES? BONE. DO, FORMANĜU ĜIN! ESTU ALPORTATA LA KUKO!
CLAP!
TION NI EĈ VOLIS PROPONI, HO REĜINO...
OBELIKS, ĈU VI HAVAS TRANĈILON AŬ TORTOSPATELON?
TIE ESTAS UNU.
ĈU VI PERMESAS?
FORTRANĈU DE LA TORTO TRI PECOJN!
JEN, JEN!
ONI DIRIS AL VI TRI PECOJN, OBELIKS!
HO, MI JA FORTRANĈIS TRI PECOJN!
MANĜU, MANĜEGULO!
KUN MIGDALOJ... MAĈ!... MMM!... KIEL BONGUSTAS LA MIGDALOJ!
SCROTCH!
SLAP!
SCRONCH!
ĈU, DO, MIA REĜINO? NUN VI KLARE KONSTATAS KE LA KUKO NE ESTAS VENENA!
SED MIA GUSTUMISTO? PRO KIO LI MALSANAS?
OBELIKS!
RESTIS ANKORAŬ KELKAJ MIGDALOJ...
ALKONDUKU LA GUSTUMISTON! MI RESANIGOS LIN!
ĈIAM KIAM MI VOLAS ION, S-RO ASTERIKS ESTAS KONTRAŬ TIO.
ĈAR S-RO OBELIKS NE SCIAS DECE KONDUTI EĈ ANTAŬ REĜINO!!!


FORTRINKU TION, GUSTUMISTO, KAJ VI FARTOS PLI BONE!
DO, ILIN BATI ESTAS BONE, SED MANĜI MIGDALOJN ESTAS MALBONE?
KAJ BATOJ, KAJ MIGDALOJ, ĈIO HAVAS SIAN TEMPON! TIO NOMIĜAS BONA EDUKO!!!
GLUT, GLUT, GLUT
MI FARTAS PLI BONE... MULTE PLI BONE...
MI FARTAS TUTE BONE. MI MALSA-TAS!
LA KUKO HAVAS NENION KUN LA MALSANO DE VIA GUSTUMISTO, HO REĜINO. LIA STOMAKO ESTAS TRO SENTEMA PRO TRO ABUNDA MANĜADO!
MI ESTIS MALJUSTA AL VI, GAŬLOJ. MI DONACAS LIBE-RECON AL VI KAJ MI MALDUN-GAS LA GUSTUMISTON, KIES STOMAKO KULPAS PRO LA ERARO DE LA REĜINO DE ĈIUJ REĜINOJ.
EN TIU KUKO TROVIĜIS SUFIĈE DA VENENO POR MOR-TIGI TUTAN KOHORTON DA LEGI-ANOJ. MIA FELIĈO ESTIS KE NI HAVIS OKAZON FORTRINKI LA KONTRAŬVENENON.
KORAN DANKON. LA METIO DE GUSTUMISTO NAŬZAS MIN... VENENAS LA VIVON...
MI EKIRAS KAJ FORLASAS VIN. JAM ESTAS TEMPO POR MIA LUNĈO.
NI REVENU AL LA KONSTRUEJO. NI DEVAS TROVI TIUN, KIU KULPAS PRO LA ATENCO PER VENENO.
ASTERIKS, KIO ESTAS KONTRAŬ-VENENO?
KAJ DUME EN LA KONSTRUEJO...
SNUFIKS! PRESKAŬ VI FALIGIS MIN!
DANKON AL RAO, VI REVENIS! MIA MASTRO NUMEROBIS MALAPERIS TUJ POST VIA ARESTO!
!!!
38


OBELIKS, NI IRU AL PIRAMIDOFIS!
...OM POSTE...
TIO DEVAS ESTI IE TIE, LAŬ LA ADRESO KIUN DONIS AL NI SKRIBOBIS.
ÉCOLE
MALFERMU, SE VI DOMAĜAS VIAN PORDON, JE BELENOS!
KIA BRUO, JE...
GA... GA... GAŬLOJ...
JES, LA GAŬLOJ, KIUJ DEZIRAS PAROLI KUN VIA MASTRO PIRAMIDOFIS
MI... MI VIDOS ĈU LI ESTAS TIE...
BONA IDEO! MI AKOMPANOS VIN!
MASTRO, TIE ESTAS IU KIU DEZIRAS PAROLI KUN VI...
?!
La faraona heroldo
VI! ĈU KLEOPATRA NE ĴETIS VIN AL KROKODOJ...
TIO ESTAS KONFESO!
OO, ESTAS VI KIU SENDIS AL KLEOPATRA LA VENENAN KUKON!
KUKON! KIAN KUKON? NE, NE. TIO ESTAS ERARO. TIO ESTAS ERARO. HO, HO, HO!


KAJ NUN DIRU KIE ESTAS NUMEROBIS!
NENIAM! NENIU FORTO EN LA MONDO PAROLIGOS MIN. ĈU NE, ŜRAŬBOBIS?
NE. MI PREFERAS PAROLI. NUMEROBIS ESTAS KAŜITA EN SARKOFAGO, EN LA KELO.
MALKURA-ĜULO!
JES, MASTRO!
MI GARDOS ILIN AMBAŬ, OBELIKS. VI IRU EN LA KELON KAJ SERĈU LA SARKOFAGON.
JES, ASTERIKS.
ASTERIKS, KIO ESTAS SARKOFAGO?
TIO ESTAS GRANDA SKATOLO. TRE, TRE PEZA.
HO, JES. BONE!
IOM POSTE...
ĈU TIO ESTAS ĜI, ASTERIKS? TIO ESTAS LA SOLA GRANDA SKATOLO KIUN MI POVIS TROVI, SED ĜI NE ESTAS TRE PEZA!
EVIDENTE ESTAS ĜI!
ONI NUR MALVOLVU ĜIN.
ĈU MI POVAS, ĈU MI POVAS? TIO ESTAS KIEL DONACO ENHAVANTA SURPRIZON INTERNE!




KIEL VI FARTAS, NUMEROBIS?
TIEL, TIEL. MI HAVAS VERTIĜON.
TIO ESTAS CERTE PRO MALSATO! MALFELIĈA NUMEROBIS!
MI KONFESAS MIAN MALVENKON. MI VOLIS MALHELPI LA KONSTRUADON. DE NUN SEN KONFLIKTO, ĈU?
POR KE VI PRUVU TION, NI KONDUKOS VIN AL NI. MI HAVAS TASKETON POR VI.
IOM POSTE EN LA KONSTRUEJO...
JEN KIE MI ESTAS, KAJ ĈIO NUR PRO TIO ĈAR VI PELIS MIN FARI MALBONON, MASTRO!...
EKSILENTU KAJ TIRU, TUJ.
LA KONSTRUADO BONE PROGRESAS, NUMEROBIS.
DANK' AL VI TRI, MIRAKLOMIKS.
SAMTEMPE EN LA PALACO DE KLEOPATRA.
AVE, KLEOPATRA. ĈU PROGRESAS LA KONSTRUADO DE LA PALACO?
EĈ TRE BONE PROGRESAS, JULIUS. BALDAŬ NI POVOS FESTI LA DEDIĈON DE LA KONSTRUAĴO.
AVE, CEZARO!
AVE, LEGIANO. VENIGU MIAN EGIPTAN SPIONON GINFIS!
AVE, CEZARO!
AVE, AVE, GINFIS! MI PERDOS MIAN HONORON ANTAŬ KLEOPATRA...
ONI DIRIS KE LA ARKITEKTO NUMEROBIS ESTAS MALKAPABLULO. TAMEN ŜAJNAS KE LA PALACO ESTOS ĜUSTATEMPE FINITA. VIDU EN LA KONSTRUEJO KIO OKAZAS, JE JUPITERO!



MI METIS LABORISTAN ANTAŬTUKON. TIEL NENIU REKONOS MIN.
MI ESTAS SPECIALISTO POR SUBTILAJ LABOROJ, SED MI AKCEPTAS ANKAŬ MALFACILAJN TASKOJN. ĈU VI BEZONAS MIN?
HO, JES! ĈIAM NI BEZONAS LABORISTOJN. STARU EN LA VICO, TIE!
AL PIRAMIDOFIS KAJ ŜRAŬBOBIS DONU NENIOM DE LA ELIKSIRO, KOMPRENEBLE!
KOMPRENEBLE.
STRANGE. SEN VIPO, SEN VIPANTO. KION MI ATENDAS TIE?
STRANGA SUPO... HA, JEN LA SIGNALO POR LA KOMENCIĜO DE LA LABORO...
BUUU
?!
MI DEMANDAS MIN ĈU TIO ESTAS SEKVO DE LA STRANGA TRINKAĴO?...
JE APISO!!!
VIDU! KIEN VOLAS TIU?
PA! TIAJ LABORISTOJ NE MANKAS!
SIDU, SNUFIKS, SIDU, NU!


HO, CEZARO! MI VIDIS EFIKANTAN MAGION EN LA KONSTRUEJO. LA LABORISTOJ RICEVAS IAN MAGIAN ELIKSIRON KIU DONAS AL ILI FORTEGON KAJ ILI KAPABLAS LEVI EĈ PLEJ PEZAJN ŜARĜOJN. ANKAŬ MI TRINKIS LA ELIKSIRON!
MI DEMANDAS MIN, GINFIS, ĈU VI NE TRINKIS ION ALIAN?
ĈU VI NE KREDAS AL MI, HO CEZARO? MI ESTAS MALFORTA HOMO, KONSTITUCIE DELIKATA, MALSANEMA. KAJ TAMEN, MI ESTAS CERTA KE MI KAPABLAS VENKI LA PLEJ FORTAN EL VIAJ GARDISTOJ!
BRUTUS, DONU KELKAJN BATOJN AL TIU SINIMAGULO!
CLAP!
HI! HI! HI! HI! HI! HI! HI! HI!
FRAP!
HI! HI! HI! HI! HI! HI!
?!
EN ORDO, BRUTUS. VI POVAS FOR... DANKON.
HI! HI! HI! HI! HI! HI! HI! HI! HI!
DO, VI NE MENSOGIS. TAMEN MI KONAS NUR UNU HOMON KIU KAPABLAS PREPARI TIAN ELIKSIRON...
SED LI ESTAS TRE MALPROKSIME DE ĈI TIE... IU GAŬLA DRUIDO...
LA GAŬLA DRUIDO!?
EN LA KONSTRUEJO EĈ ESTAS GAŬLOJ. TRI GAŬLOJ!
KION? ĈU MALJUNA DRUIDO KUN LONGA BLANKA BARBO, UNU MALALTA RUZULO KAJ UNU DIKA KONFUZULO?
PRECIZE TIUJ ESTAS ILI, HO CEZARO!
ASTERIKS, OBELIKS KAJ MIRAKLOMIKS! LA NEVENKEBLAJ GAŬLOJ! ILI FARAS DIVERSAJN MIRAKLOJN!... ONI DEVAS ION ENTREPRENI...


LA POSTAN MATENON, EN LA MILDA LUMO DE LA AŬRORO...
KOKERIKO-O-O
IOM POSTE, EN LA KONSTRUEJO...
MASTRO! MASTRO! VENU VIDI! IO STRANGA OKAZAS!!!
SED JES, KIO OKAZAS, SKRIBOBIS?
LA LABORISTOJ NE VENIS EN LA KONSTRUEJON... KROM NIAJ ARESTITOJ, PIRAMIDOFIS KAJ ŜRAŬBOBIS, NENIU PLU!
?!?
INFORMIĜU IOMETE!
JES, MASTRO!
IOM POSTE...
LA ROMIAJ LEGIANOJ SIEĜAS LA KONSTRUEJON! ILI MALPERMESAS ENIRI AL NIAJ LABORISTOJ!
JE LA NOMO DE CEZARO! NI EKSCIIS KE TIE KAŜAS SIN LA GAŬLAJ RIBELULOJ. NI ORDONAS KE VI KAPITULACU. SE NE, NI ATAKOS!
?!?
ĈI TIE NI ESTAS LAŬ DEZIRO DE KLEOPATRA KAJ NI NE FORIROS ĜIS LA LABORO ESTOS FINITA, JE TUTATO!
VI BEDAŬROS PRI TION, JE JUPITERO!
KION NI FARU NUN, JE IZISO?
NI KONSTRUOS MUREGON, JE BELENOSO.
VI PRAVAS, JE BELISAMO!
ĈU MI EBLE RAJTAS FORIRI?




URŜU VIN KUN VIAJ ŜTONOJ, OBELIKS!
JEN! JEN!
BONE. NIA FORTIKAĴO ESTAS FINITA.
ĈU... ĈU VI KREDAS KE ĜI SUFIĈOS POR REBATI ROMIANOJN?
ILI ATAKAS!
POR LA ATAKO LA ROMIANOJ APLIKIS TERURAN TAKTIKON NOMATAN "TESTUDO"...
BUM! PUM!
ĈU VI POVAS IOMETE SERIOZIĜI, OBELIKS?
BUM!
PUM!
OUAF! OUAF!
DUM LA RETIRIĜO LA ROMIANOJ UZIS EFIKAN TAKTIKON NOMATAN "LEPORO".
HMMM... TIO NE EFIKIS... SED BONE. NI ATAKOS DE PLURAJ FLANKOJ SAMTEMPE. DISIĜU!
SED APENAŬ NI KUNIĜIS!
ĈU SERIOZE?
ŜERCE! JES, MORT-ŜERCE!
ANKORAŬ UNU TIA VORTO KAJ MI DIZERTOS!!!
BELEGE! ILI DENOVE VENAS!
VAŬ VAŬ




* TIEL PLAĈAS AL LA DIOJ.


VERE, IOM POSTE...
PAF!
BONG!
MIA PALACO!
ONI INFORMU KLEOPATRAN! ŜI DEVAS INFLUI CEZARON, KE LI ĈESIGU LA ATAKON.
BONA IDEO! SKRIBOBIS, SKRIBU MESAĜON AL LA REĜINO!
HO... NUR SEN ORTOGRAFIAJ ERAROJ... TIO ESTAS EN AKUZATIVO, SE STARAS ANTAŬ...
BUM
SNUFIKS PORTOS LA MESAĜON AL KLEOPATRA!...
SNUFIKS?
SED ĜI ESTAS TRO MALGRANDA!
EBLE TRO MALGRANDA, SED SAĜA!
JEN LA MESAĜO!
VI VIDOS!
?
EKIRU SNUFIKS! AL KLEOPATRA!
?
MI JAM DIRIS, KE ĜI ESTAS TRO JUNA POR KOMPRENI TION!
TRO JUNA! HUNDETO KIU JAM POVAS HOMSTARI KAJ CETERE...
EN ORDO, ASTERIKS. NE OFENDIĜU! MI NUR IOMETE PROVOKIS VIN... MI NUN MEM TURNOS ĜIN AL LA ĜUSTA DIREKTO.
MIA HUNDO, KAJ TRO MALGRANDA!
RAPIDE, MIRAKLOMIKS! DUM OBELIKS NE RIGARDAS NIN, DONU AL MI GLUTON DE LA MAGIA ELIKSIRO!
GRRRRGGGFF... PHI!... GUNGGLL MRGLLGRGLLL!...
TUJ POSTE...
EKIRU NI SNUFIKS!
?



ALARMO! IU EL LA SIEĜITOJ PROVAS ELIRI!
PUUM!
ĈU PRETA?
PRETA!
BUM!
?
PUM!
SAME KIEL LI VENIS TIEL LI REVENIS...
MALLONGA RESTADO...
IOM POSTE EN LA PALACO DE KLEOPATRA...
VI VOLIS VIDI MIN, HO GAŬLO!
JES, HO KLEOPATRA! MIA ETA HUNDO PORTAS MESAĜON POR VI.
KIEL DOLĈETA ĜI ESTAS... ONI ALPORTU OSTON POR LA HUNDETO!
TIO NE PASOS NUR TIEL! JULIUS CEZARO NE ESTAS HONESTA LUDANTO, JE IZISO. FORIRU, GAŬLO, MI PRIZORGOS ĈION, JE AMONO KAJ HELIO!
ESTU KVIETA SNUFIKS... ATENDU ĜIS LA NOVA GUSTUMISTO DE LA REĜINO FINOS GUSTUMADON DE VIA OSTO!


ALARMO! UNU EL LA SIEĜITOJ PROVAS REENIRI!
PUMM!
VIDU OBELIKS! SNUFIKS REVENIS KAJ PERFEKTE FARIS SIAN TASKON!
HA! ĈU VI VIDAS?
NI ESPERU KE LA REĜINO BALDAŬ AKTIVIĜOS! LA ROMIAJ MILITMAŜINOJ DETRUAS LA PALACON!
VERE, ĈE LA SIEĜANTOJ...
VIDU, HO CEZARO. EĈ SE NI NE SUKCESOS KAPTI ILIN, LA REZULTO ESTOS LA SAMA: LA PALACO ESTOS DETRUITA!
BONE, BOMBUS, BONE!
AVE CEZARO... HM... IU DEZIRAS PAROLI KUN VI CEZARO...
KIU DEZIRAS...
DZIM! BUUM!
TRATTERATRAA
?!?



HA, MIA REĜINO! MIA PLEJ ŜATATA REĜINO...
SUFIĈE! KIAM MI EKSCIIS KIO ĈI TIE OKAZAS, MI ELIRIS KURANTE EL LA PALACO, MI EĈ NE ŜANĜIS LA VESTAĴON!
OPS!
SE ONI VETAS, ONI KONDUTU SPORTE. MIA RAJTO ESTIS ALVOKI LA GAŬLOJN KAJ MI MONTROS AL VI KE EGIPTOJ KAPABLAS KONSTRUI LA PLEJ BELAJN PALACOJN...
...KAJ MI POSTULAS KE VIAJ LEGIANOJ TUJ FORIRU KAJ LASU KONSTRUANTOJN EN PACO. KAJ ANTAŬ LA FORIRO ILI RIPARU LA TUTAN DOMAĜON KIUN ILI KAŬZIS. TIO ESTAS HONTO...
... KAJ...
BONE, BONE, ĈIO EN ORDO. MI PETAS VIAN PARDONON KAJ MI FAROS ĈION KION VI DEZIRAS...
ĜINGTARASA! BUMM! TRATTERATRA
DO... HO... KION NUN?
ĈESIGU LA SIEĜON KAJ RIPARU LA FARITAN DOMAĜON, STULTULO!!
AVE!
MI NE DEZIRAS KE KLEOPATRA STREĈU LA NAZON KONTRAŬ MI!
CETERE ŜI HAVAS TRE BELAN KAJ ELSTARAN NAZON, SE NI ANKORAŬ NE DIRIS TION...
VIDU, LA ROMIANOJ ĈESIGAS LA SIEĜADON, JE BELENOSO!!!
VENKO, JE TUTATO.
DANK' AL KIU?


ILI UNUE DETRUIS KAJ POSTE HELPAS NIN RIPARI...
ILI FRENEZAS, LA ROMIANOJ!
NE. NUMEROBIS. NE!
SED MI SUPOZIS KE PINTA TEGMENTO ESTUS PLI BELA...
FINE, IUN BELAN TAGON.
TIEL! KAJ NUN NI IRU INFORMI KLEOPATRA!
HO MIA REĜINO! LA PALACO ESTAS FINITA KAJ NI EĈ NE SUPERIS LA LIMDATON!*
* EN TIU TEMPO TIO MALOFTE OKAZIS!
VI PLENUMIS VIAN PROMESON KAJ MI PLENUMOS LA MIAN. JE IZISO!
SUPERŜUTU LIN PER ORO!
TIE ELSTARAS ANKORAŬ UNU PECETO!
MI VENOS ANKORAŬFOJE!
MORGAŬ MI INVITOS CEZARON SUR MIAN SOLENAN GALERON...
NI VETURIGOS NIN LAŬFLUE ĈIS LA PALACO. MI TRANSDONOS ĜIN AL CEZARO, KAJ PER TIO MI ANKAŬ PRUVOS KE MIA POPOLO NE ESTAS DEKADENCA!
ĜUSTE TIEL!



LA MORGAŬON...
NE ESTAS MALBONA LA PALACO, ĈU NE?
TIE ILI ESTAS!
KIE, KIE?
POR LA TRANĈO DE LA RUBANDO, HO CEZARO!
HO, LA PLEJ BELA EL ĈIUJ REĜINOJ, APARTENU AL VI LA HONORO TRANĈI LA RUBANDON, KIO PRUVAS KE MI PERDIS LA VETON... KAJ MI RIVERENCAS ANTAŬ VIA GRACIECO.
LA POPOLO AKLAMAS AL LA REĜINO ALVOKANTE LA SUNDION...
RA! RA! RA! RA!
JEN!
FINE BELA "JEN"!
POST TIO OKAZIS BANKEDO POR 14000 GASTOJ (UNUE ONI ANTAŬVIDIS NUR 13000 GASTOJ, SED EGIPTOJ ESTAS SUPERSTIĈAJ)...
VI SAVIS MIAN VIVON KAJ INSTRUIS MIN LABORI... MIA ORO APARTENAS AL VI!
NENIEL, NI HAVIS PLEZURON... KION VI FAROS NUN?
MI REAMIKIĜIS KUN PIRAMIDOFIS...
NI DUOPE KONSTRUOS LA PLEJ BELAJN KAJ LA PLEJ PINTAJN PIRAMIDOJN!



IOM POSTE, ĈE KLEOPATRA...
NIA TASKO ĈI TIE ESTAS FINITA. NI VENIS ADIAŬI VIN, HO REĜINO.
TIU NAZO...
VI AGIS MAJESTE! VI MERITIS DANKEMON DE LA REĜINO DE ĈIUJ REĜINOJ: DE MI.
MI DONACAS AL VI, HO DRUIDO, KARAJN MANUSKRIPTOJN ELEKTITAJN EN MIA ALEKSANDRIA BIBLIOTEKO...
VIA NAZO... HM... VIA MOŜTO ESTAS TRO BONA, JE BELENOSO...
KIA NAZO!
ŜAJNAS KE TIO ESTAS EĈ TRO MALMULTE POR LA HELPO KIUN VI FARIS ĈI TIE... MI MEM NE SCIAS KIEL DANKI AL VI...
POR LA REĜINO AGO KOMPLEZA NENIAM ESTAS TRO PEZA! SE VI FOJE EKDEZIRAS KONSTRUI ION ALIAN EN EGIPTIO, EKZEMPLE KANALON INTER MEDITERANEO KAJ LA RUĜA MARO ...
... VOKU TIAM IUN EL NI. JE TUTATO!...
TUJ POSTE...
TRE LAŬDINDE ESTAS KE KLEOPATRA MEM DISPONIGIS SIAN PERSONAN GALERON POR LA VOJAĜO AL GAŬLUJO...
... KAJ LA KAPITANO JAM DONAS ORDONOJN POR NAVIGADO...
DING! DING!
DING! DING!
PER PLENA FORTO ANTAŬEN!
ĈU VI SUPOZAS KE NI RENKONTOS PIRATOJN, ASTERIKS?
MI NE SCIAS, SED MI HAVAS AN SENTON KE ILI TROVIĜAS IE PROKSIME!
FAKTE, EN LA SUBFERDEKO...
MI DEVIS AKCEPTI TIUN LABORON POR KE MI ELPAGU LA PERDON DE LA LASTA ŜIPO. TUJ KIAM MI POVOS, MI AĈETOS LA NOVAN, POR KE MI VENĜU MIN KONTRAŬ LA GAŬLOJ!



POST KELKSEMAJNA LUKSA KROZADO...
SCROĈH! SCROĈH!
... JEN FINE...
GALERO!!! ASTERIKS, OBELIKS KAJ MIRAKLOMIKS REVENAS!
MI VERKOS ETAN KANTON...
LA GAŬLA VILAĜO BONVENIGAS SIAJN HEROOJN PER KUTIMA ENTUZIASMO KAJ SOLENA VESPERMANĜO...
ĈIO TIO ESTAS LA MERITO DE SNUFIKS!
TIU NAZO, KARA MIA... TIU NAZO!
KAJ DUM LA VENONTAJ TAGOJ ĈIUJ ESTIS FELIĈAJ... PRESKAŬ ĈIUJ.
NE, OBELIKS, NE!
LA NOVA FORMO DE VIAJ MENHIROJ NE PLAĈAS AL MI... NI RESTU GAŬLOJ!
FINO DE LA RAKONTO!




ISBN 953-6157-20-9

9 789536 157204